


BAHAISMO KAJ ESPERANTO

La Bahaa Religio kaj ĝiaj rilatoj al Esperanto



“La Tero estas nur unu lando kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.”

Bahá'u'lláh

La Bahaa Kredo estas monda religio fondita meze de la deknaŭa jarcento de Bahá'u'lláh, kiun liaj adeptoj, la bahaanoj, kredas esti la Promesito de ĉiuj epokoj. La kerna celo de Bahaismo estas la unueco de la tuta homaro, la kreo de tutmonda socio surbaze de unueco en diverseco. Bahá'u'lláh diras: «Kion la Eternulo ordonis kiel suverenan kuracilon kaj plej fortan rimedon por resanigi la tutan mondon, estas la unuiĝo de ĉiuj popoloj en unu universala religio, unu komuna Kredo.»¹

Ja ĉiuj Kredoj kaj la tradicioj de preskaŭ ĉiuj popoloj promesas estontecon en kiu paco kaj harmonio regos surtere kaj la homaro vivos en prospero. Tiu promesita epoko, tiel kredas bahaanoj, kun la veno de Bahá'u'lláh komenciĝis kaj ke estas liaj instruoj kiuj ebligas al la homaro konstrui tiun novan mondon.

Unu el la principaj instruoj de Bahá'u'lláh koncernas la enkondukon de universala lingvo: «La tago alproksimiĝas kiam ĉiuj popoloj de la mondo akceptos universalan lingvon kaj komunan skribon. Kiam tio estas atingita, ĉiu homo, kiun ajn urbon li vizitos, kvazaŭ eniros en sian propran domon... Tiu vere estas homo, kiu hodiaŭ dediĉas sin al la servo al la tuta homaro... Ne glori sin tiu, kiu amas sian propran landon, sed tiu, kiu amas la tutan homaron. La Tero estas nur unu lando, kaj ĉiuj homoj ĝiaj civitanoj.»²

En la 21-a jarcento la homaro staras antaŭ la nepra bezono trovi unuecan vizion pri la rolo de la unuopulo kaj la pluevoluigo de la socio. Laŭ Bahá'u'lláh estas la rea interveno de Diosenditoj kiaj estas Abrahamo, Kriŝno, Moseo, Budho, Jesuo kaj Mahometo, kio donas la direkton al la civilizacia procezo, al la formiĝo kaj prospero de kulturo. Tra ilia gvidado la homo kapablas malkovri kaj disvolvi siajn latentajn moralajn kaj spiritajn kapablojn kaj starigi la necesajn regulojn kaj instituciojn por funkcia socio.

La homaro tiun eternan evoluoprocezon dume nur tre nebule komprenas kaj pasinteco, anstataŭ vidi la religiajn revelaciojn kiel unu grandan komunan spiritan heredaĵon, konstruis ĉirkaŭ la unuopaj revelacioj proprajn ekleziajn kaj teologiajn sistemojn, kiuj tro ofte inter si konfliktas kaj baras la vojon al ekvido de la granda fona intenco kaj komuna vizio.

Kun la apero de Bahá'u'lláh por la homaro ĝermas nova spirita printempo. Li komparis la evoluon de la homaro kun tiu de individuo kaj klarigis ke same kiel tiu sinsekve trairas la stadiojn de bebeco, infaneco, junuleco kaj matureco tiel faras ankaŭ la homaro, kiu nune eniras sian maturecon kaj unuafoje kapablas vidi kaj kompreni la tutan panoramon de sia ĝisnuna evoluo kiel unusolan procezon.

La defio de la matureco estas akcepti la responson, liberigi de la limigoj de la pasinteco kaj bonvenigi la unuiĝon de la tuta homaro en unu granda tutmonda socio. La universala revelacio de Dio efektiviĝinta en la personeco de Bahá'u'lláh liveras la spiritan forton kaj la instruojn kaj principojn por tiun grandiozan vizion efektiviĝi.

Enhavo

- 4 Bahaismo en la Esperanto-movado**
- 6 Esperantistoj kaj bahaanoj – rilatoj multfacetaj**
- 9 Bahaa Esperanto-Ligo**
- 10 La bahaaj skriboj pri la principo de internacia helpa lingvo**
- 11 Enkonduki internacian lingvon: Propono de Bahaa Internacia Komunumo**
- 12 Lidia Zamenhof**
- 14 Bahaismo**
- 18 Notoj**
- 18 Glosaro**
- 19 Bahaa literaturo en Esperanto**

Fotoj:

© Bahá'í International Community: paĝoj 1, 2-3, 5, 6, 7, 8, 11, 13, 14, 15, 16, 17, 20. © Sjoerd Bosga: paĝo 1. © Bahaa Esperanto-Ligo: paĝo 9. Ceteraj: publikpropraĵo.

Bahaismo kaj Esperanto
eldonita de

Bahaa Esperanto-Ligo
Eppsteiner Straße 89, DE-65719 Hofheim, Germanio
bel@bahai.de – www.bel.bahai.de
© Bahaa Esperanto-Ligo, 2009

*“Tial la unueco de la tuta homaro en la nuna tago povas esti atingata. ...
Vidu kiel ĝia lumo nune aŭroras super la malheligita horizonto de la mondo.
La unua kandelo estas unueco en la politika sfero, kies unuajn glimojn jam eblas pecepti.
La dua kandelo estas unueco de pensado en mondaj entreprenoj, kies efektivigon post nelonge eblos atesti.
La tria kandelo estas unueco en libereco, kiu certe efektivigos.
La kvara kandelo estas unueco de la religio, kiu estas la angulŝtono de la
fundamento mem, kaj kiu, per la potenco de Dio, videbliĝos en plena sia brilego.
La kvina kandelo estas la unueco de la nacioj – unueco kiu dum tiu ĉi jarcento estos sekure establita,
kaŭzante ke ĉiuj popoloj de la mondo sin konsideros kvazaŭ civitanoj de unu komuna patrujo.
La sesa kandelo estas unueco de la rasoj, kiu faros ĉiujn kiuj vivas surtere homoj kaj anoj de unu sola raso.
La sepa kandelo estas unueco de la lingvo, t.e. la elekto de universala
lingvo kiu estos al ĉiuj homoj instruata kaj per kiu ĉiuj interkomunikos.
Ĉio tio neeviteble efektivigos, ĉar la potenco de la Regno de Dio helpos kaj asistos je ĝia realigado.”³*

‘Abdu’l-Bahá

La demando ĉu enkonduki komunan lingvon kaj precipe kiu estu tiu lingvo estas ege tikla kaj sentiva afero, kiu ne simple solveblas. Kaj dum ankaŭ ene de la tutmonda bahaa komunumo dolore sentatas la manko de tia lingva interkomprenilo ankaŭ bahaanoj foje emocie diskutas pri la plej taŭga solvo.

Jen iuj estas konvinkitaj ke ja la angla nepre estos la lingvo elektota. Jam nun ankaŭ en la bahaa mondo ĉefe ĝi la rolon de interlingvo provizore plenumas. Tio povas tamen ne esti konsiderata kvazaŭ ia antaŭdecido. Konstatendas ke «estas, tamen, nenio en la bahaaj instruoj kio sugestas ke la angla fariĝos la internacia helpa lingvo»⁴.

Aliaj bahaanoj opinias ke la estonta interlingvo povos esti nur la araba, la lingvo en kiu estas revelaciitaj la plej eminentaj verkoj de Bahá'u'lláh, la fondinto de Bahaismo. Kaj denove aliaj ankaŭ volonte vidus kiel favoriton la persan – la gepatra lingvo de Bahá'u'lláh kaj de la ankoraŭ plej grava etna grupo ene de la bahaanaro.

La esperantistoj ene de la bahaa komunumo tiel okupas pozicion iom malfacilan malgraŭ ke trastudado de la citaĵoj el

la aŭtoritataj bahaaj tekstoj rilate la principon de internacia helpa lingvo kaj Esperanto facile konvinkas pri la alta rango kiun tiuj tekstoj donas al planita neŭtrala lingvo kaj al Esperanto mem kiel solvon de la lingva demando. (Vidu paĝojn 10-11).

Oni povus surbaze de tiuj tekstoj veni al la konkludo ke el bahaa vidpunkto fine la mondo adoptu ian reformitan Esperanton. Tiel, interese, la universala lingvo fariĝus lingvo samtempe jam ekzistanta, planita kaj nove kreita! Tamen, ankaŭ aliaj konkludoj eblas kaj ĉio tio dume estas nura spekulativo kaj tute senfrukta. Tro da aŭtoritataj komentarioj emfazas, ke ne eblas antaŭscii kiu estos la lingvo elektota, ke ne estas la tasko de la bahaanoj elekti la internacian helpan lingvon, sed de la monda politika gvidantaro, kaj ke kion bahaanoj subtenu estas ne iu konkreta lingvo aŭ lingvoprojekto sed precipe la ideo mem enkonduki internacian helpan lingvon.

Jen la fono de longdaŭraj, foje tre intensaj kaj ne ĉiam tute glataj rilatoj inter la bahaanoj kaj la esperantistoj, kiuj sur tiuj ĉi paĝoj estas pli detale prezentataj.

Bahaismo en la Esperanto-movado

La unua mencio de Bahaismo en Esperantujo okazis eble en esperanta periodaĵo, nome en *Amerika Esperantisto*. Troviĝas en n-ro 84, dec. 1911, de *The British Esperantist* artikolo referencanta «laŭ Amerika Esperantisto». Tiu artikolo prezentas Bahaiston kiel religi(anoj)unuigan movadon kaj redonas tiuteman leteron de 'Abdu'l-Bahá.

En 1913 kaj 1914 pli ofte aperas artikoloj ligitaj al la vojaĝoj de 'Abdu'l-Bahá tra okcidenta Eŭropo kaj norda Ameriko. Almenaŭ du el liaj paroladoj antaŭ esperantistaj kunvenoj, tiuj en Edinburgo je la 7a de januaro 1913 kaj en Stutgarto je la 5a de aprilo 1913, aperis en esperantaj gazetoj. Evidente ankaŭ la Esperanto-movado atentis pri la proklamado de Bahaismo far 'Abdu'l-Bahá dum liaj historiaj vojaĝoj tra la Okcidento, kaj jam tiutempe unuaj bahaanoj aktivis helpe de Esperanto kaj pere de la esperantaj periodaĵoj.

'Abdu'l-Bahá tamen ne nur per siaj rektaj kontaktoj al esperantistoj atentigis bahaanojn pri la Esperanto-movado kaj ilin kuraĝigis lerni la lingvon kaj kunlabori kun esperantistoj en la Okcidento. Per siaj kuraĝigoj li ankaŭ forte subtenis la penetron de Esperanto al Okcidenta Azio. Al Irano li mem invitis Esperanto-instruistojn. Rezulte i.a. en la tridekaj jaroj en la bahaa lernejo en Aŝhabado, Turkmenio, Esperanto estis regula studobjekto. Krome inter tiuj bahaanoj, kiuj portis la Kredon al Orienta Azio, al Japanio kaj Ĉinio, estis ankaŭ aktivaj esperantistoj kiuj tie aktivis ne nur per sed ankaŭ por la lingvo.

tiel ĝia plena titolo, estis fondita de la bahaanoj esperantistoj Friedrich Gerstner kaj Hermann Grossmann en Hamburgo, Germanio, kaj en ĝia stabo dum la sekvaj jaroj kunlaboris i.a. Lidia Zamenhof, Martha Root, John E. Esslemont, August Forel (la fama svisa scienculo), Vuk Echtner kaj kiel lingva kontrolanto la plej multan tempon Paul Christaller.

Probable profunde konvinkita pri la rekta respondo de Esperanto al la bahaa postulo de internacia helpa lingvo kaj pri ties sekva pluprospereco kaj plia disvastiĝo la fondintoj de tiu unua internacia bahaa gazeto celis ne nur krei interligilon por la rapide disvolviĝanta bahaa komunumo, sed ja ankaŭ ilon por proksimigi la esperantistaron al Bahaismo. Esence jam tiam bahaa Esperanto-agado estis same dudirekta kiel ĝi restis ĝis hodiaŭ; Gerstner skribis en la unua n-ro de la 2a jarkolekto: «Ni volas ... 1. konigi al la Esperantistaro la ideojn de la Baha'i-Movado kaj 2. disvastigi la Esperantismon en Baha'i-rondoj.»

Dum pluraj jaroj *La Nova Tago* sufiĉe bone prosperis. Sed post kriza jaro – inter marto 1934 kaj marto 1935 neniu numero aperis – la gazeto sukcesis nur dum unu jaro ankoraŭ releviĝi. Tiam venis la malpermeso en Germanio de Esperanto en 1936 kaj sekvajare ankaŭ de Bahaismo far la nazioj.

Malgraŭ ĉiaj atingoj dum tiu ĉi jardeko estis nek la esperantistoj amase akceptintaj Bahaiston nek la bahaanoj vere grandskale ekutiligintaj Esperanton – stato kiu ĝis hodiaŭ daŭras.



Membroj de la Internacia Auxiliara Lingva Komitato (komitato por internacia helpa lingvo) kiun en la 1930aj jaroj instalas la Nacia Spirita Asembleo de la bahaanoj de Usono; dua de dekstre: Roan Orloff-Stone, kunfondinto kaj long-jara sekretario de Baha'a Esperanto-Ligo

1925 estis la jaro inaŭguranta la jardekon de la probable ĝis hodiaŭ plej intensa agado de bahaanoj en Esperantio. En la pri-UK-a raporto en *ESPERANTO*⁵ tekstas i.a.: «La du kunvenoj en la baha-Oficejo estis eble plej interesaj el la fakaj, ne nur pro la intereso kiun elvokis la ideoj mem de Bahaismo, ankaŭ pro la ĝenerala simpatio kaj partopreno de konataj samideanoj...».

Apud la aktivecoj dum kaj ekster la Universalaj Kongresoj klare elstaras la fondo de la gazeto kaj eldonejo *La Nova Tago* en 1925. *La Nova Tago* – *La Internacia Baha'a Esperanto-Gazeto*,

En 1937-38 Lidia Zamenhof ankoraŭ relative sukcese faris ampleksan vojaĝon – komune organizita de bahaanoj kaj esperantistoj – tra pluraj usonaj urboj por tie Cseh-metode instrui Esperanton. Sed la tempo fariĝis pli kaj pli sufoka por Esperanto. Kaj post la Dua Mondmilito ankaŭ en la bahaa komunumo Esperanto suferis periodon de nur malrapida refortiĝo.

Post tiu uragano nur jen kaj jen reekfloris vivsignoj. La unua postmilita Universalaj Kongreso en 1947 en Berno, Svisio, ekzemple ricevis bahaajn salutojn, laŭ kongresa raporto en

Post la inaŭgura ceremonio por la novkonstruitaj terasoj ĉirkaŭ la maŭzoleo de Báb en Haifa, Israelo, la 23an de majo 2001 miloj da partoprenantoj reprezentantaj la bahaajn komunumojn tra la tuta mondo supreniras la subajn terasojn al la maŭzoleo



Shoghi Effendi

ESPERANTO⁶, «per telegramoj plejparte en Esperanto, de la Bahaa movado en Cairo, de Shoghi Rabbani [la «Gardanto» Shoghi Effendi] en Haifa, de Rowhani en Teheran, de Adelaide, Romo, New Delhi, Nederlandaj Bahaanoj en Amsterdam, de Stockholm, Oslo kaj fine de la Britaj kaj Belgaj Bahaanoj».

Krome ek de marto 1947 la Internacia Bahaa Oficejo en Ĝenevo eldonis regule bultenon, la *Bahaaj Informoj*, kiu aperis en entute 14 numeroj ĝis oktobro 1949 kaj estis ĉefe direktita al la nebahaaj esperantistoj por ilin interesigi pri Bahaismo. La ĉesigo de tiu bulteno estas probable ne nur indiko pri relative magraj tiurilataj sukcesoj, sed verŝajne ankaŭ pri tio ke post la Dua Mondmilito kun la nordamerika bahaaj komunumo – kiu estis jam de la komenco de la jarcento kune kun la irana la plej potenca kaj plej grava en la tutmonda bahaanaro – la angla lingvo fariĝis ĉiam pli grava. Postmilito la emfazo en la bahaaj komunumo estis plene metita al kiom eble vasta tutmonda etendiĝo kaj establiĝo. Dum tiuj jardekoj la bahaanaro fariĝis vere tutmonda komunumo, tiel ke hodiaŭ ĝi estas la due plej disvastiĝinta religio post Kristanismo, kun signifaj komunumoj en pli ol 200 landoj kaj dependaj teritorioj. Tiun disvastigon grandparte efektivigis la nordamerikaj bahaanoj.

Tiuj ja uzis sian anglan lingvon respektive lernis la lingvojn de la landoj al kiuj ili portis la Kredon. Esperanto probable ankaŭ tial en tiu procezo malgravis, ĉar la landoj celitaj plejparte apartenis al la t.n. «tria mondo» kien Esperanto dume estis apenaŭ penetrinta. Tie kaj jene kelkaj bahaaj esperantistoj ja provis vivteni la kontakton inter la movadoj kaj utiligi Esperanton kiel forumon por disvastigi Bahaismon, sed veran reputacion la lingvo regajnis inter almenaŭ la eŭropaj bahaanoj nur en la okdekaj jaroj, kiam evidentiĝis ke ĝi povus funkcii kiel pleje taŭga ilo por trapenetri la «feran kurtenon» kaj tiel atingi tutan mondoparton kien sola la komunumo ankoraŭ ne estis sukcesinta porti sian torĉon.

Tiel en la okdekaj jaroj precipe en Eŭropo bahaanoj sufiĉe multnombre eklernis Esperanton. Tion aparte spronis letero de la Universala Domo Justeco de la 17a de septembro 1986, kiu tekstas: «Karaj bahaaj geamikoj, atingis la Mondcentron inspiraj raportoj pri la sukceso de la Universala Kongreso de Esperanto en Pekino, Ĉinio, kaj la partopreno en ĝi de membroj de Bahaa Esperanto-Ligo. La sekva kongreso okazos en Varsovio, la ĉefurbo de Pollando kaj hejmo de Ludoviko Zamenhof, inventinto de Esperanto, kies filino, Lidia, estis tiome devota adepto de Bahá'u'lláh. Ni opinias ke enkadre de siaj porpacaj



klopodoj la bahaanoj de Eŭropo bone farus, se ili pliintensigus sian kunlaboradon kun la Esperanto Movado, kaj ni kuraĝigas la bahaanojn, kiuj emas asisti ĉi-kampe, lerni Esperanton kaj aktive partopreni la aktivecojn de tiu Movado. Kvankam kaj 'Abdu'l-Bahá kaj Shoghi Effendi ambaŭ klare diris ke neniel estas certe ke Esperanto fine elektiĝos kiel la internacia helpa lingvo de la mondo, 'Abdu'l-Bahá tamen, kiel vi scias, kuraĝigis la amikojn en la Oriento kaj en la Okcidento ĝin lerni kiel praktikan paŝon antaŭen je la proklamado de la koncepto de adopto de internacia helpa lingvo por rompi la barojn al la interkompreniĝo de la popoloj. La adeptoj de Bahá'u'lláh kunlaboras kun multaj diversaj individuoj kaj asocioj je la antaŭenigo de projektoj por ekonomia kaj socia evoluo kaj cele al la establo de monda paco. Tial estus bone se kelkaj el ili, komprenante la gravecon de tio, aktive kunlaborus kun la esperantistoj, kiuj, kiel ili konstato, dividas multajn de iliaj idealoj.»

La rezulto estis multa entuziasmo kaj sindediĉo de eble centoj da bahaanoj kiuj dum la sekvaj jaroj efektive sukcesis aliti al la Kredo tutan aron el la orienteŭropaj esperantistoj, tiel ke la bazon de la nunaj tieaj komunumoj signife kunformas esperantistoj. La fenomeno estis tamen iom pajlofajra: Baldaŭ jam Esperanto ree perdis signifon ene de la bahaaj komunumo. La baza bahaaj literaturo ekzemple estis rapide tradukita ankaŭ al la orienteŭropaj lingvoj kaj kun la sendependiĝo de la tieaj bahaaj komunumoj en ili ekregis la naciaj lingvoj – kaj por internaciaj kontaktoj servas precipe la angla.



Bahaa preĝkunveno en Barato

Esperantistoj kaj bahaanoj – rilatoj multifacetaj

Estas indikoj ke komence de la 20a jarcento la tiutempaj bahaanoj estis grandparte konvinkitaj ke estas ĝuste Esperanto tiu internacia helpa lingvo, kies enkondukon profetas iliaj sanktaj skriboj. Lidia Zamenhof en letero de marto 1938 eĉ konsideris Esperanton «tiu lingvo, kiu – mi estas profunde konvinkita – estis kreita rekte sub la influo de Bahá'u'lláh, kvankam la aŭtoro de la lingvo tion ne sciis.»⁷ Siatempe almenaŭ en Eŭropo plejmulto el la bahaanoj estis ŝajne se ne aktivaj esperantistoj minimume apogantoj de la Lingvo Internacia. Tiu impresio certe estiĝas je trastudado de la bahaa Esperanto-gazeto *La Nova Tago*, eldonita en la dudekaj kaj tridekaj jaroj de la 20a jarcento.

Al tio certe pleje kontribuis la favora sinteno de 'Abdu'l-Bahá elmontrita precipe dum liaj historiaj vojaĝoj al la Okcidento en 1911–1913 kiam ankaŭ plurfoje li parolis antaŭ esperantistoj, esprimis sian altan estimon pri la movado kaj rekte alvokis al plua disvastigo de la lingvo. Post la forpaso de 'Abdu'l-Bahá en 1921, kiam la bahaa komunumo ekgvidis lia nepo Shoghi Effendi, ankaŭ tiu plu kuraĝigis lerni kaj uzi la lingvon kaj i.a. mem plurfoje per plej estimaj kaj kuraĝigaj vortoj salutis Universalan Kongreson.

Iom post iom tamen ŝanĝiĝis la tono en la leteroj de Shoghi Effendi. Pli kaj pli estas atentigata pri tio ke kion bahaanoj precipe subtenas estas la ideo de internacia helpa lingvo kaj ke neniel oni povas esti certa ke ĝuste Esperanto estos tiu lingvo. Plue estas klarigata ke ne estos la bahaanoj, kiuj decidis pri la estonta

helpalingvo, sed ke tion devos efektiviĝi la politikaj gvidantoj de la homaro, ke «la registaroj de la mondo pere de siaj parlamentoj estas alvokataj efektiviĝi tiun ĉi gravegan leĝon»⁸. Unue devos okazi vasta esplorado, diskutado kaj interkonsiliĝado surbaze de kiu venos la fina decido.

Sekve la bahaanoj sin engaĝas por la ĝenerala principo enkonduki – iun ajn! – internacian helpan lingvon. La Esperanto-movado dume estas «movado por la internacia lingvo Esperanto». Kaj oni eble povas sin demandi ĉu ĝi ne tiel iom malfidelas al Ludoviko Zamenhof kaj ankaŭ ignoras ke eventuale per sia strikta ligiteco al Esperanto ĝi povas kompromiti sian reputacion ĉe tiuj instancoj kaj aŭtoritatoj, kiuj iam devos decidi pri la lingvo elektenda kiel la dua lingvo por ĉiuj. Ĉar ja oni devas konjekti ke tiuj instancoj kaj aŭtoritatoj postulos plenan liberecon ekzameni la tutan aferon respektive ĉiujn eblajn alternativojn.

Koncerne la rilatojn inter esperantistoj kaj bahaanoj la Universala Domo de Justeco en letero al BEL jene la bahaajn esperantistojn avertis: «La Universala Domo de Justeco konscias ke foje vi devas fronti iom embarasajn situaciojn en la rilatoj kun viaj kunesperantistoj ĉar, kiel bahaanoj, vi estas plene konsciaj pri tio ke, malgraŭ ĉiuj ĝiaj kvalitoj, Esperanto eble ne estos la internacia lingvo kiu fine estos elektita, kaj ke estas la ideo de internacia lingvo kiun la bahaanoj entuziasme subtenas pli ol iun specifan solvon de la problemo. La averto de

la Gardanto ke bahaanoj devas esti plene malfermaj pri tiu afero rilate al esperantistoj por tiel eviti seriozajn miskomprenojn kaj konfuzojn en la estonteco, sendube grave asistos vin en via laboro kaj ebligos al vi antaŭeniri kun plena entuziasmo, sen, kiel ajn, aperi kiel velanta sub falsa flago.»⁹




Ludoviko Lazaro Zamenhof

Foje eĉ eminentaj esperantistoj ŝajne esperis trovi en la bahaa movado gravan, eble eĉ la rimedon por definitive venkigi Esperanton kaj tial en ĝi membriĝis. Klare ke pli aŭ malpli frue ili devis seniluziiĝi kaj sekve retiriĝis el la komunumo kaj la Kredon denove forlasis – se ne eĉ ekmalamikis kontraŭ ĝi. Al tio sendube kontribuis ke la bahaaj esperantistoj ne ĉiam elmontris al siaj verdaj samideanoj sian starpunkton tiom aperte kiel Shoghi Effendi kaj la Universala Domo de Justeco tion rekomendis.

Alia kaŭzo por malglataj rilatoj estas certe ke bahaanoj konsideras sian Kredon kiel multe pli vastan, ampleksan kaj sekve ankaŭ gravan idearon ol la Esperantismon. La Universala Domo de Justeco en sia letero al la iniciatintoj de BEL, per kiu ĝi aprobis la fondon de la Ligo, skribis: «Via fervoro por Esperanto kiel funkcia internacia lingvo estos, ni sentas, rekompencata per la eniro en la Kredon de multaj el viaj esperantistaj kamaradoj, kiuj tiel faros la paŝon de universaleco lingva al la pli grandaj universalecoj de unu religio kaj unu homaro.»¹⁰ En tiu ĉi frazo resonas kion duonjarcenton pli frue la tiam ĵus bahaaniĝinta Lidia Zamenhof multe pli malmodere kaj provoke esprimis en kontribuo por Heroldo de Esperanto: «Ŝajnas al mi, ke Esperanto estas nur¹¹ lernejo, en kiu edukas sin estontaj bahaanoj. La bahaa movado estas en antaŭmarŝo; ĝi estas pli larĝa.»¹²

Wendy Heller en sia biografio Lidia skribas pri tiu epizodo: «Evidente tio estis sufiĉe konsterniga konstato. Ke la filino mem de Zamenhof diras ke io alia estas pli larĝa ol Esperanto, ke la afero al kiu ŝia patro donis sian vivon, estas ‚nur lernejo‘, tio sendube profunde ŝokis multajn esperantistojn kaj impresis eble eĉ kiel perfido. Tamen, la kreinto de Esperanto neniam konsideris la Esperanto-movadon kiel celon en si mem, sed kiel rimedon por eduki homojn pri unueco. Zamenhof ja kredis ke la ideo de

neŭtrala lingvo neniam povus sukcesi sen monda religio. Kion diris Lidia ... ŝajnis kvazaŭ eĉi kion Ludoviko Zamenhof diris al la Universala Kongreso de Esperanto en 1907: ‘Tom post iom Esperantujo fariĝos edukejo de la estonta interfratigita homaro.’ ... La filino de Ludoviko Zamenhof ne vidis kontraŭdiron aŭ lojaleckonflikton en tio ke ŝi akceptis la Bahaan Kredon. Ĝiaj esencaj instruoj ne konfliktis kun la ideoj de Zamenhof, sed ŝajnis male ilin konfirmi kaj vastigi. Jen la koncepto de la zamenhofa Homaranismo: unu Dio kiel la nekonebla Kreinto de ĉio, unu homaro kiu vivu en paco kiel unu granda homara familio, la kongruo kun la esencaj instruoj de la Grandaj Instruistoj de la pasinteco, akordo inter scienco kaj religio, universala helpa lingvo. Sed kiam la principoj samas, kial akcepti la Bahaan Kredon super la Homaranismon? ... Ludoviko Zamenhof neniam pretendis fondi religion, sed la bahaaj instruoj, Lidia ekkredis, tenas en si la potencon de dia inspiro. ‘En la Instruo de Bahá’u’lláh, Lidia klarigis multajn jarojn poste, ‘mi trovis la universalecon, kiun nur la vere Dio-donita instruo povas doni al la serĉanta homaro. Tial ĝi ek-allogis min.»¹³



‘Abdu’l-Bahá

«La vere Dio-donita instruo» – jen el bahaa vidpunkto la evidenta «manko» ĉe Zamenhof. Bahaismo ja estas vera religio, estas «Dio-donita instruo». Ĝi ne nur proklamas la samajn monduuigajn idealojn kiel Zamenhof – kaj eĉ plenkore pledas por la adopto de internacia helpa lingvo kaj komuna skribo –, sed ĝi esence transiras la karakteron de ia boncela, idealisma movado. Ĝi «la tutan homon» postulas: «Kun bona volo kaj persisto helpa lingvo – aparte tia kun la karaktero de Esperanto – povas facile kaj relative rapide esti lernata; la Afero [t.e. la Bahaa Kredon] tamen postulas ke homoj ne nur ŝanĝas certajn ideojn sed mem sian karakteron kaj siajn kutimojn; kaj tio estas multe pli malfacile farebla kaj ofte konsumas longan tempon!»¹⁴

Eble ne Ludoviko Zamenhof, sed ja lia plej juna filino estis konvinkita, ke «la homaro ... ekzistas por koni sian Kreinton kaj por servi al Lia intenco»¹⁵, ke kredi »estas necesa kaj neelradikebla bezono de nia specio ... kiun ne eblas nei»¹⁶, ke «la kapablo de la animo akiri komprenon pri la intenco de sia Kreinto rezultas ne nur el propraj penadoj, sed el Diaj intervenoj malfermantaj la vojon»¹⁷, kaj ke homo rekonu la «centran veron de la revelaciita

religio: ke aliro al tiu nekonebla Realo, kiu kreas kaj vivtenas, nur eblas tra la vekigo por la iluminado verŝita el tiu Regno.»¹⁸

Religian kredon tamen ne eblas altrudi aŭ preskribi. Eblas nur inviti al ĝi. Ĉiu devas mem libere ekzameni kaj tiri siajn konkludojn. La Universala Domo de Justeco skribis, klarigante la necesajn kondiĉojn de religia konvertiĝo: «La ĉefa motivo ĉiam estu la respondo de la homo al la Mesaĝo de Dio kaj la akcepto de Lia Mesaĝisto. Tiuj kiuj bahaaniĝas estu ravitaj per la beleco de la instruoj kaj tuŝitaj per la amo de Bahá'u'lláh.»¹⁹

Ne maloftas ke homo kapablas sincere turniĝi al la mondo transcenda kaj eksperti enanime ĝian tuŝon nur post longaj, eble doloraj internaj baraktoj.

Krome Bahaismo, estante vera, plenrajta religio – fakte la plej abunda elverŝo de Dia Revelacio dum la ĝisnuna religihistorio – kun siaj instruoj etendiĝas tra ĉiuj sferoj de la homa vivo kaj per sia spirita profundeco same kiel per la vasteco de sia instruaro ja nepre superas same la Esperantismon kiel la Homaranismon. Kaj tiel, malgraŭ ĉia konformeco inter la ideoj, havas nepre tute alian kvaliton fariĝi bahaano ol aniĝi en la Esperanto-movado.

Multajn esperantistojn supozeble seniluziigas la eltrovo, ke la bahaanaro, ĉar ĝi havas propran koncepton pri la demando de internacia helpa lingvo, ne nepre estas ĉiel facila aliancano je la batalado por la disvastigo de Esperanto. Sed la demando kial ne bahaaniĝas pli da esperantistoj estas por tiuj mem certe malpli interesa ol la inversa: kial ne pli multe da bahaanoj fariĝas aktivaj esperantistoj? La kvarcentmembra BEL ja relative etsignifas ene de la bahaa komunumo kun siaj pli ol kvin milionoj da anoj.

Kiel jam klarigite, bahaanoj pli subtenas la principon mem de internacia helpa lingvo ol iun konkretan lingvon. Tial evidente multege pli da bahaanoj ol la aktivaj esperantistoj inter ili apogas kaj elkore subtenas la Esperanto-movadon. Tamen, la unuaranga celo de bahaano estas la diskonigo de la nova revelacio, de la «ĝoja mesaĝo» ke reaperis Dio surtere.

Tiel oni povas rezoni ke la bahaaj esperantistoj vidas por si esence du taskojn: diskonigi Bahaismon inter la esperantistoj kaj demonstri al la bahaa mondo – same kiel la Esperanto-movado tion faru al la ĝenerala mondo – la funkciadon de Esperanto, t.e. prui ke tiu ĉi planlingvo vere funkcias kaj plenrajte estas serioza kaj ŝancoriĉa kandidato por fariĝi la estonta monda interlingvo.

La nuntempan sintenon de la bahaa komunumo al la demando pri internacia helpa lingvo bone resumas la jeno: «La Universala Domo de Justeco sentas ke, se ĝi elektus iun lingvon por la bahaanoj uzota kiel internacia helpa lingvo, tio kaŭzus pli da malfaciloj ol per tio estus solvataj nuntempe. La amikoj [t.e. la bahaanoj], tamen, rememorante ke tio estas unu el la tre gravaj principoj de la Kredo, farus bone se ili subtenus la ideon ĉiam kiam eblas kaj preĝus ke la tempo ne plu foras kiam la registaroj de la nacioj adoptos unu solan lingvon por esti instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel helpa al la gepatra lingvo de la lernantoj.»²⁰

Jen ankaŭ koncize la fokuso de la bahaaj esperantistoj, kiuj ek de la sepdekaj jaroj de la 20-a jarcento kolektiĝas en Bahaa Esperanto-Ligo.



Bahaa Esperanto-Ligo

Estas indikoj ke la ideo pri fondo de ia asocio de bahaaj esperantistoj leviĝis jam menze de la 20-a jarcento kaj precipe antaŭ la 1966-a UK en Budapeŝto. Tiuj ĉi klopodoj estas ligitaj al la persono de Adelbert Mühlischlegel. Ili tamen restis sen konkretaj rezultoj. Estis nur post kiam en Brazilo Paŭlo Amorim Cardoso en 1971 estis akceptinta la Kredon, ke per liaj klopodoj, kaj helpe de precipe la usonanino Roan Orloff-Stone la ideo relative rapide realiĝis.

Estis dum la 57-a UK en 1972 en Portland, Usono, ke kunvenis la naŭ partoprenantaj bahaanoj kaj decidis submeti peton al la Universala Domo de Justeco, ke ĝi aprobu la fondon de asocio de bahaaj esperantistoj. Post konsulto de Adelbert Mühlischlegel, kiu tiam estis jam «Mano de la Afero de Dio» kaj «entuziasma» pri tiu propono, la Universala Domo de Justeco donis sian aprobon per letero datita la 19-an de marto 1973: jen la naskiĝdato de Bahaa Esperanto-Ligo. Samjare estis elektita ankaŭ la unua, naŭpersona estraro. Tiutempe BEL havis 73 membrojn el 14 landoj: Argentino 1, Aŭstrio 1, Brazilo 24, Germanio 1, Hispanio 3, Italio 2, Irano 4, Israelo 1, Kanado 4, Koreio 1, Nederlando 1, Portugalio 2, Svislando 1, Usono 27.

La unuaj aktivecoj de la Ligo estis, apud la kolekto de membroj, la eldono de unuaj simplaj bahaaj materialoj en Esperanto kaj traktado pri la esperantigo de bahaaj terminoj kiel ekz. la 19 monatonomoj de la bahaa kalendaro. Ankaŭ la Ligo submetis al UEA peton fariĝi kunlaboranta faka asocio, kio efektiviĝis la sekvan jaron, 1975, dum la UK.

Stando de Bahaa Esperanto-Ligo dum la UK 1996 en Prago, Ĉeĥio



Malgraŭ ĉiaj atingoj la unuaj jaroj por la nova Ligo estis sufiĉe malfacilaj. Precipe pro la disjetiteco tra la tuta mondo de ne nur la membraro sed ankaŭ la estraranoj la agado limiĝis al tiu de unuopuloj kaj multo koncentriĝis ĉe la sekretario. La unua estis P. A. Cardoso, Brazilo. Apud li plej grava por la disvolviĝo de la Ligo estis Roan Orloff-Stone, Usono, kiu partoprenis ĉiujn

UK-ojn inter 1976 kaj 1988. La Ligo tiel povis helpe de tiuj ĝiaj motoroj kaj kelkaj kromaj membroj kutime almenaŭ reprezenti Bahaismon ĉe la UK-oj.

Dum la lastaj jardekoj la agadon de la BEL karakterizas sufiĉa konstanteco je relative malalta agadnivelo. Daŭre funkcias kiel interna informilo la dufoje jare aperanta *La BELmonda Letero*. Per ĝi BEL sukcesis krei firman bazon de interna informado. La novaj komunikaj teknologioj ankaŭ ne preterpasis Bahaan Esperanto-Ligon: Jam delonge ĝi havas sian propran hejmpaĝon (www.bel.bahai.de) kaj ankaŭ por la interna komunikado pli kaj pli estas utiligata perreta korespondado, precipe ene de la estraro.



Antaŭ la UK 2000 en Tel-Aviv, Israelo, grupo de BEL-membroj dum kelkaj tagoj vizitis la bahaan mondcentron en Haifa, Israelo

La membraro de BEL dum la jaroj iom post iom kreskis ĝis super 400, sed post reviziado komence de la naŭdekaj jaroj preskaŭ duoniĝis – por tamen iom post iom realtiĝi ĝis aktuale denove preskaŭ 400 en ĉirkaŭ 60 landoj. Plej multnombros la anoj nun en Germanio kaj Bulgario (po pli ol 50), Britio, Rusio, Ukrainio kaj Usono (po pli ol 20), Aŭstralio, Hispanio kaj Pollando (po pli ol 10).

La Ligo dekomence sin financas per libervolaj donacoj de siaj membroj kaj neniam aplikis kotizsistemon. Krome ĝi ricevas foje subtenojn de unuopaj Naciaj Spiritaj Asembleoj (NSA) aŭ de aliaj bahaaj instancoj.

BEL dum la lastaj jaroj fokusis sian agadon je aktiva partopreno en la Universalaj Kongresoj, foja artikolado en la esperanta gazetaro kaj la eldono de kelkaj gravaj bahaaj dokumentoj, ĉu komplete kiel en 1986 *La Promeso de Monda Paco*, en 1992 *Bahá'u'lláh*, en 2002 *Al la Religiaj Gvidantoj de la Mondo* kaj en 2008 *Unu komuna Kredo*, aŭ per resumaj faldfolioj, kiel en 1996 *La prospero de la homaro kaj Turnopunkto por ĉiuj nacioj*. Foje BEL ankaŭ informas ene de la bahaa komunumo diversmaniere pri la lingvo kaj movado esperanta.

La bahaaj skriboj pri la principo de internacia helpa lingvo

Ho membroj de la parlamentoj tra la mondo! Elektu vi ununuran lingvon por la uzo fare de ĉiuj surtere kaj adoptu vi same skribon komunan. Dio, vere, igas evidenta al vi el kio vi profitos kaj ebligos al vi esti sendependaj de aliaj. Li, vere, estas la Plej Malavara, la Ĉion-Scia, la Ĉion-Konanta. Tio ĉi kaŭzos unuecon, se nur tion kapablas vi kompreni, kaj montriĝos la plej granda ilo por antaŭenigi harmonion kaj civilizacion, ho ke tion vi perceptu!²¹

Bahá'u'lláh

Sed rilate la universalan lingvon: Post nelonge signifaj kaj sciencaj diskutoj koncerne ĉi aferon leviĝos inter la homoj komprenemaj kaj kleraj kaj kondukos al la dezirata rezulto.²²

'Abdu'l-Bahá

Vi skribis pri la lingvo Esperanto. Tiu ĉi lingvo disvastiĝos kaj universaligiĝos certagrade, sed poste lingvo pli kompleta ol tiu aŭ la sama lingvo trairos kelkajn ŝanĝojn kaj modifojn kaj estos adoptata kaj fariĝos universala. Mi esperas ke d-ro Zamenhof estos asistata per la nevidebla konfirmo kaj faros grandan servon al la mondo homara.²³

'Abdu'l-Bahá

Ofte lingvo fariĝas la rimedo por unuigi diversajn naciojn kaj rasojn. Tion oni spertis precipe en la orientaj landoj. Ekzemple la egiptoj estis aparta nacio. Ankaŭ la asirianoj fondis grandan regionon. La civilizacio de la kaldeanoj estis eminenta en la malnova kulturmondo. Unu lingvo fine superis la aliajn kaj unuigis la kaldeanojn, asirianojn kaj egiptojn, ke ili eĉ forgesis siajn gentnomojn kaj unuigis. Hodiaŭ ili estas nomataj araboj. Kial? Ĉar la araba lingvo fariĝis reganta lingvo super la aliaj. Se ni hodiaŭ demandas egipton, al kia nacio li apartenas, li respondas: Mi estas arabo! Same ni trovas tion ĉe la kaldeanoj kaj asirianoj. Ili respondas: Ni estas araboj! Tio ĉi pruvas al ni, ke la lingvo estas kapabla unuigi la popolojn.

La modernaj nacioj havas tre multajn malpacojn kaj konfliktojn inter si, kies kaŭzoj plej ofte devenas de malkompreno pro diverseco de lingvo. El tio naskiĝis la ideo de la internacia lingvo. Tiu ĉi efikus pli forte ol patriotismo aŭ rasa sento. Bahá'u'lláh, kiu aperis en la Oriento, deklaris, ke estas necese serĉi unuecan lingvon, por ke tiu ĉi internacia helplingvo fariĝu la plej forta kunligilo inter la diversaj nacioj, forigante la malkomprenojn inter la popoloj. ... Tial estas la plej bona solvo, fondi unu helplingvon, uzebla por ĉiuj popoloj.

D-ro Zamenhof estas la fondinto de tia lingvo. Kiam nun tiu ĉi lingvo estas instruata en ĉiuj publikaj lernejoj de la mondo, tiam la popoloj atingos la superan kulturstaton, tiam ĉiu devas lerni nur du lingvojn, la gepatran lingvon kaj la internacian lingvon. Se estas

Por provizi kompletan interkomprenon inter la popoloj, universala helpa lingvo estos adoptata kaj en la lernejoj de la estonto du lingvoj estos instruataj – la gepatra lingvo kaj tiu ĉi internacia helpa lingvo, kiu estos aŭ unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ nova lingvo konstruita el vortoj de ĉiuj lingvoj – la afero estos decidata far koncilio renkontiĝanta por tiu celo kaj reprezentanta ĉiujn tribojn kaj naciojn.²⁴

'Abdu'l-Bahá

Bahá'u'lláh preskribas la adopton de universala lingvo kaj skribo. Liaj skriboj antaŭvidas du ŝtupojn en tiu procezo. La unua ŝtupo konsistas en la elekto de ekzistanta aŭ inventita lingvo, kiu tiam estos instruata en ĉiuj lernejoj de la mondo kiel dua (helpa) apud la gepatraj lingvoj. La registaroj de la mondo pere de siaj parlamentoj estas alvokataj efektivigi tiun ĉi gravegan leĝon. La dua ŝtupo, en la dista futuro, estos la fina adopto de unu sola lingvo kaj komuna skribo por ĉiuj surtere.²⁵

La Universala Domo de Justeco


disvastigata la helplingvo tra la tuta mondo, malaperos multe da malkomprenoj, ĉar malkomprenoj, kiel jam dirite, kaŭzas la plej fortan malbonon, kaj la kaŭzo de ĉiuj tiuj malkomprenoj ja estas manko de tia lingvo. ... Do, internacia helplingvo estas certe la fundamento por la kunligo de la popoloj kaj granda potenco por unuigi la religiojn. En la Oriento estas multaj hebreoj, kristanoj kaj mahometanoj. Sed ĝis nun ne intermilitis la kristanaj araboj kaj mahometanaj araboj, ĉar ili povis interkompreniĝi; ili povas interŝanĝi reciproke siajn pensojn. Sed ĉiam interbatalis turkoj, bulgaroj kaj grekoj, ĉar ili neniam povis atingi la fundamenton de komuna lingvo. Tiuj ĉi estas ekzemploj, certaj pruvoj, ke internacia helplingvo unuigos la homaron. ... Kiel bela kaj mirinda estus interkompreniĝo per unu lingvo. Tiam la Oriento kaj Okcidento povus unuigi kaj ni estus kvazaŭ kiel unu nacio.

Tial ni ĉiuj propagandu Esperanton, por ke venu granda amikeco inter la homoj. ... Ĉiu entreprenu celanta la unuigon de l' homaro estas dia. Tial ni povas certigi, ke la efikoj de l' universala helplingvo estas diaj, se ni konsideras ĝiajn rezultojn.

Ni devas labori kaj klopodi, ke tiu ĉi lingvo fariĝu parto de la instruado en ĉiuj publikaj lernejoj. Estas absoluta devo de ĉiu nuntempo, ke li akcelu la ellernadon de la ĝenerala helplingvo. Ĉar tiu lingvo estos la rimedo por altigi la signon de l' paco kaj de l' frateco inter ĉiuj.²⁶

'Abdu'l-Bahá

Enkonduki internacian lingvon: Propono de Bahaa Internacia Komunumo



En oktobro 1995 Bahaa Internacia Komunumo (NRO reprezentanta la tutmondan bahaaron) publikigis sub la titolo *Turnopunkto por ĉiuj Nacioj* dokumenton kies subtitolo estas: «Deklaro de la Bahaa Internacia Komunumo okaze de la 50-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj». Tiu deklaro estas kaj profunda pristudo de la situacio de la UN kaj proponaro por ĝia pluevoluiĝo. Inter la proponoj por «Difini la rolon por la UN ene de la estiĝanta internacia ordo» estas farata interalie ankaŭ propono rilate internacian helpan lingvon. Sekvas la teksto de la koncerna paragrafo²⁷:

Devontigo al universala helpa lingvo kaj komuna skribo

Por la Unuiĝintaj Nacioj, kiuj aktuale uzas ses oficialajn lingvojn, aŭ la elekto de unu el la ekzistantaj lingvoj aŭ la kreo de nova por la uzado kiel helpa lingvo en ĉiuj ĝiaj forumoj signifus konsiderindan avantaĝon. Tia paŝo jam delonge estas proponita de multaj grupoj, de la esperantistoj ĝis mem la Bahaa Internacia Komunumo*. Krom al ŝparo de mono kaj simpligo de administrataj procedoj tia paŝo signife kontribuas al la antaŭenigo de spirito de unueco.

Ni proponas la nomumon de altnivela komisiono kun membroj venantaj el diversaj regionoj kaj el rilataj terenoj, enklude de lingvistoj, ekonomoj, socisciencistoj kaj homoj el edukado kaj la amaskomunikiloj, por komenci zorgan studadon de la afero de internacia helpa lingvo kaj adopto de komuna skribo.

Ni antaŭvidas ke fine la mondo neeviteble devos adopti unu universale agnoskitan helpan lingvon kaj skribon por instruado en lernejoj tra la tuta mondo kiel suplementon al la lingvo aŭ lingvoj de ĉiu lando. La celo estas faciligi la transiron al globala socio pere de plibonigita komunikado inter nacioj, reduktado de administrataj kostoj por komercado, registaroj kaj aliaj envolvitaj en globalajn entreprenojn, kaj ĝenerala fortikigo de pli elkoraj rilatoj inter ĉiuj anoj de la homara familio**.

Tiu ĉi propono estu konsiderata laŭlitere. Ĝi neniel imagas la rifuzadon de iu ajn vivanta lingvo aŭ kulturo.

* «Rilate la tutan demandon de Internacia Lingvo... Ni, kiel bahaanoj, tre deziras la kiom eble rapidan adopton de universala helpa lingvo; ni tamen ne estas la protagonistoj de iu ajn specifa lingvo por plenumi tiun postenon. Se la registaroj de la mondo interkonsentos pri iu ekzistanta lingvo aŭ pri planita, nova



lingvo por la internacia uzado, ni elkore subtenos ĝin, ĉar ni kiom eble rapide deziras vidi la efektiviĝon de tiu paŝo survoje al la unuiĝo de la homaro.»²⁸

Farante tiun ĉi proponon ni deziras atentigi pri la termino «helpa». La bahaaj instruoj alte taksas kaj subtenas kulturalan diversecon, ne unuformecon. Nuntempe ni tial ne imagas la altrudon de unu sola lingvo tra la tuta mondo. Ni preferus vidi ke la popoloj kaj nacioj konservas siajn lokajn kaj naciajn lingvojn – dum ili samtempe estos kuraĝigataj lerni universalan lingvon. Certe tia universala lingvo estu fine instruita, kiel deviga studobjekto, en ĉiuj lernejoj de la mondo. Sed tio neniel limigu la legitiman esprimiĝadon de nacia kaj loka lingva kaj kultura diverseco.

** «La tago alproksimiĝas kiam ĉiuj popoloj de la mondo akceptos universalan lingvon kaj komunan skribon», skribis Bahá'u'lláh fine de la dekaŭa jarcento. »Kiam tio estas atingita, ĉiu homo, kiun ajn urbon li vizitos, kvazaŭ eniros en sian propran domon.»²⁹

Lidia Zamenhof

Ĉiu esperantisto pli-malpli konas la historion de tiu viro, kiu modeste sin nomis 'iniciatoro' de Esperanto. Sed la membroj de lia familio, liaj fratoj, edzino kaj gefiloj, kiuj ankaŭ aktivis en la Esperanto-movado, jam preskaŭ tute forgesiĝis. Escepto estas nur Lidia Zamenhof, kiu ludis gravan rolon kaj en la Esperanto-movado kaj en la Bahaa Kredo. Por bahaaj esperantistoj ŝi tial neniel forgesiĝas.

«La tuta homaro devas unuiĝi en unu familio» – jen la moto, kiu priskribas la celon, kiun Ludoviko Zamenhof donis al sia vivo kaj por kiu li sinofere laboradis ĝis sia morto en 1917. Ne la kreo de iu bela universala lingvo, taŭga por komerco kaj verkado estis lia ĉefa celo, sed la tasko je kiu li fokusis ĉiujn siajn fortojn estis la disvastigo de la ideo pri homara interfratiĝo.

En tia etoso, reganta en la hejmo de Ludoviko Zamenhof kaj akceptita ankaŭ de liaj proksimaj parencoj, naskiĝis kaj kreskis la zamenhofaj gefiloj Adamo, Zofia kaj Lidia. Kiam Lidia naskiĝis en 1904, ŝiaj gefratoj jam estis preskaŭ plenkreskaj kaj ŝi kun ili ne povis multe interrilati, ĉar ili studis medicinon en Svislando. Kaj ankaŭ poste ili ne ofte vidis unu la alian.

Lidia infane havis nenian emon lerni Esperanton. En 1909, kiam oni festis la 50an datrevenon de la naskiĝtago de Ludoviko Zamenhof, multaj esperantistoj kunvenis kaj faris gratulajn paroladojn. Lidia, siatempe kvinjara knabino, post ioma aŭskultado enĵetis: «Pri kio tiuj homoj parolaĉas? Mi komprenas eĉ ne unu vorton!» Kaj proteste ŝi forlasis la feston.

En 1913 la Universala Kongreso de Esperanto estis okazonta en Berno, Svislando, kaj Lidia estis naŭjara, pro kio oni povis plani, ke ŝi kune kun la gepatroj vojaĝu al la kongreso, ankaŭ por tie renkonti siajn gefratojn. Grandega problemo tamen estis, ke Lidia obstine ne volis lerni Esperanton kaj komprenis nur kelkajn vortojn. Tiam la patrino klarigis al ŝi, ke ŝi devos resti hejme, se ŝi ne lernos la lingvon, kaj tio finfine efikis. Ene de ses semajnoj Lidia lernis tiom, ke ŝi povis interkomunikiĝi en Esperanto.

Ludoviko Zamenhof mortis dum la Unua Mondmilito, la 14-an de aprilo 1917, kiam Lidia estis nur 13-jara. Tiutempe jam ŝi plene regis la lingvon kaj faris unuajn provojn traduki el la pola. Ŝia kuzo Stephen raportis, ke ŝi ĉiam estis okupita pri tradukado en Esperanton kaj ke ŝi estis konvinkita, ke ŝi devos daŭrigi la laboron de la tro frue mortinta patro.

En 1921, en la aĝo de 17 jaroj, Lidia finis siajn gimnaziajn studojn kaj estis akceptita de la Varsovia universitato kiel studento de juro. Sian studadon ŝi finis en 1925 kun la akademia grado de magistro pri juro. Por ŝi tamen estis klare, ke ŝi iel dediĉos sian vivon al la idealoj de sia patro. Esperantujo estis ŝia hejmo.

Dum la Universala Kongreso de 1925 en Ĝenevo okazis i.a. ankaŭ fakkunveno de la bahaaj esperantistoj, al kiu Lidia estis invitita. Ŝi tute ne deziris tien iri, sed fine pro ĝentileco tamen partoprenis kaj tiel konatiĝis kun Adelbert Mühlshlegel kaj Martha Root. Ankaŭ la fratino de Lidia, Zofia, partoprenis la aranĝon kaj tie legis artikolon de sia patro pri la neceso havi universalan religion.

La sekvan jaron, 1926, oni finfine inaŭguris la Zamenhof-monumenton en Varsovio. Ĉeestis ankaŭ Martha Root, kiu oficiale reprezentis la Bahaa Religion kaj parolis pri «La Bahaa Movado kiel formo de homaranismo». Ŝi restis du semajnojn en Varsovio kaj dormis kun Lidia en sama ĉambro. Ili fariĝis bonaj amikinoj, kvankam Lidia, kiu konsideris sin ateisto, komence neniel volis akcepti la religiajn konvinkojn de Martha. Tamen, iom post iom Lidia konvinkiĝis pri la vereco de la Bahaa Kredo kaj fine ĝin alprenis por si mem.

En 1928, okaze de du bahaaj kunvenoj en la kadro de la Universala Kongreso de Antverpeno, Lidia faris unufoje publikajn paroladojn, kaj tio sufiĉe mirigis la esperantistojn, ĉar ĝis tiam ŝi neniam konsentis pri publika parolado kaj estis konsiderata kiel timema kaj retiriĝema persono. La cetera zamenhofa familio neniel kontraŭis la konvertiĝon de Lidia al la Bahaa Kredo, sed ili ankaŭ ne komprenis ĝin. En 1929 Lidia eĉ publikigis artikolon pri la Bahaa Religio en pollingva juda gazeto, kaj tion tamen la familio, kaj multe pli la juda komunumo, sentis nekonvena. En 1930 Lidia vojaĝis, t.e. pilgrimis, al Haifa en Palestino, sankta loko por bahaanoj, kaj renkontis tie la tiaman gvidanton de la Bahaa Kredo, Shoghi Effendi.



Lidia Zamenhof, 1904-1942

Siatempe Lidia decidis lerni la Cseh-metodon por instrui Esperanton. La Esperanto-movado tamen ne plu estis tiel favora al Lidia kiel antaŭe; aparte oni malŝatis, ke membro de la zamenhofa familio aktivus por la disvastigo de la Bahaa Afero, timante ke la publiko ekkredus, ke la Esperantismo estas intime ligita al iu religia kredo. Sed Lidia sukcesis. En 1932 ŝi unue agadis por Esperanto en Svedio, donante plurajn prelegojn kaj lecionojn pri Esperanto, parte antaŭ 250 homoj. Post tio ŝi ricevis inviton de la Esperanto-klubo en Liono, Francio, por tie gvidi Cseh-metodajn kursojn. Per tio komenciĝis la kariero de Lidia kiel Cseh-instruistino.



Junaj francaj esperantistoj surgluas afiŝon reklamante la Cseh-kurson de Lidia Zamenhof en Liono, Francio



Lidia Zamenhof, Cseh-instruistino

Kvankam la instruado de Esperanto en publikaj lernejoj estis malpermesita en tiama Francio, la intereso por Esperanto estis grandega. Lidia instruis al klasoj kun centoj da personoj, la gazetaro favore raportis kaj la lernantoj estis entuziasmaj. Tiuj sukcesoj estis reatingitaj en pluraj francaj regionoj. En tiu tempo Lidia estis tiel sukcesa, ke ŝi povis labori por la disvastigo de Esperanto dum pluraj jaroj kaj eĉ povis vivteni sin per tio.

La grandegaj sukcesoj de Lidia en Francio fine atingis interesitajn esperantistajn rondojn en Usono, kiuj kune kun la bahaanoj invitis ŝin doni Cseh-lecionojn tie. En septembro 1937 Lidia enŝipiĝis por Usono, kie oni atendis ŝin kun miksitaj sentoj, ĉar disvastiĝis onidiro, ke Lidia estus mizera retoro. Krom tio esperantistoj kaj bahaanoj devis kunlabore organizi ŝian vojaĝon kaj restadon. Ambaŭ grupoj estis ĵaluzaj pro Lidia, kaj la esperantistoj ne fidis la bahaanojn, ĉar tiuj ja parolis pri la neceso de universala lingvo, sed apenaŭ interesiĝis pri Esperanto. Tio ŝanĝiĝis kiam Lidia eklaboris en Usono. Sed la sukcesoj ne estis tiel triumfaj kiel en Francio.

En 1938 la politika situacio fariĝis pli kaj pli kriza, la pola registaro dekretis, ke polaj ŝtatanoj, kiuj ne revenos hejmen, perdos sian ŝtatanecan, kaj samtempe la restadpermeso de Lidia malvalidiĝis. Krom tio ŝi pro nescio malobeis iun usonan

leĝon, kiu malpermesis al ŝi perlabori monon dum la restado. Kaj ŝi estis akceptinta honorariojn, kvankam malgrandajn, por la Esperanto-lecionoj. Pro tio Lidia forlasis Usonon la 29an de novembro 1938 kaj vojaĝis hejmen.

Reveninte ŝi sin dediĉis denove al tradukado kaj verkado. Interalie ŝi tradukis *Bahá'u'lláh kaj la nova epoko*, kiun jam ŝi estis tradukinta en Esperanton, en la polan lingvon.


En septembro 1939 eksplodis la Dua Mondmilito kaj Lidian trafis la sama sorto kiel ĉiujn polajn judojn. Ŝi devis vivi en la varsovia geto, kie ŝi donis lecionojn pri angla lingvo por vivteni sin. La esperantistoj ne forgesis Lidian kaj sendadis pakaĵojn al ŝi. Pola esperantisto kaj germana bahaa soldato eĉ klopodis helpi al Lidia per ebligo de fuĝo, sed Lidia rifuzis. En 1942 la nazioj komencis grandskalan ekstermadon de la judoj en Varsovio. Tiam ankaŭ Lidia estis deportita al la koncentrejo Treblinka kaj mortigita tie kiel pli ol unu miliono da samsortanoj.

La mesaĝo de Lidia Zamenhof estis la unueco de la homaro, la interfratiĝo de la homoj, la emancipiĝo de la virinoj kaj batalo por paca mondo. Ĉio ĉi radikis en la homaranismaj idealoj de ŝia patro, kiujn ŝi retrovis en ankoraŭ pli vasta formo en la instruoj de la Bahaa Kredo.³⁰

Lidia Zamenhof por la bahaaj esperantistoj okupas tute unikan pozicion. Ili tamen fieras ankaŭ pri aliaj elstaraj bahaanoj kiuj aktive uzis Esperanton. Inter ili kvin el entute kvindek kiuj distingiĝis kiel «Manoj de la Afero de Dio»³¹: Martha L. Root (1872-1939) famiĝis pro pluraj multjaraj vojaĝoj tra la tuta mondo por diskonigi la novan Kredon vaste utiligante ankaŭ Esperanton; d-ro John E. Esslemont (1874-1925) verkis la ĝis hodiaŭ plej konatan kaj multtradukitan enkondukon en la Kredon «Bahá'u'lláh kaj la nova epoko»; Agnes Baldwin Alexander (1875-1971) pleje kontribuis al la establiĝo de la Kredo en Japanio kaj Orientazio; d-ro Hermann Grossmann (1899-1968) kunfondis la esperantlingvan unuan internacian bahaan gazeton «La Nova Tago» kaj samnoman eldonejon; d-ro Adelbert Mühlischlegel (1897-1980) grave kontribuis al la formiĝo de Bahaa Esperanto-Ligo kaj estis ĝia unua prezidanto.



M. Root



J. Esslemont



A. Alexander



H. Grossmann



A. Mühlischlegel



Junaj volontuloj en la bahaa mondcentro en Israelo

Bahaismo

Bahaismo estas la plej juna el la sendependaj mondaj religioj. Ĝia fondinto, Bahá'u'lláh, por bahaanoj estas la ĝis hodiaŭ plej lasta el sinsekvo da Diaj Mesaĝistoj. Tiu vico komenciĝis jam antaŭ la registrita historio kaj al ĝi apartenas i.a. Abrahamo, Kriŝno, Moseo, Budho, Zoroastro, Jesuo kaj Mahometo.

La centra temo de la mesaĝo de Bahá'u'lláh estas la unueco de la homaro kaj ke alvenis la tago de ĝia kunfandiĝo en tutmonda socio. Nun laŭ la volo de Dio, diris Bahá'u'lláh, tradiciaj baroj de etno, nacio, klaso aŭ kredo disfalas kaj iom post iom naskiĝas universala civilizacio. La granda defio por la popoloj de la mondo estas akcepti la fakton de sia unueco kaj akceli la procezojn voje al sia unuiĝo.

Unu el la celoj de Bahaismo estas asisti je tio. En la internacia bahaa komunumo nun membras pli ol 5 milionoj da bahaanoj. Ili reprezentas la plej multajn naciojn, etnojn kaj kulturojn surtere kaj laboras por efektiviĝi la instruojn de Bahá'u'lláh. Ilia sperto estas kuraĝigo por ĉiuj kiuj dividas ilian vizion de homaro kiel tutmonda familio kaj de la Tero kiel unu hejmlando.

Bazaj instruoj de Bahá'u'lláh

Bahá'u'lláh instruis ke estas nur unu sola Dio kaj ke la sinsekvaj transdonoj de la Dia mesaĝo tra la historio estis la ĉefaj civilizaj fortoj. La Mesaĝistoj de Dio por la plej multaj homoj estas la fondintoj de apartaj religiaj sistemoj. Sed ili havis komunan celon: ke la homaro atingu moralan kaj spiritan maturecon.

La homaro nun atingis la epokon de sia matureco. Tio ebligas al ĝi unuiĝi kaj fine realigi la praagan promeson pri universala paco per starigo de tutmonda justa socio. Voje al tiu celo bahaanoj klopodas realigi inter alie la jenon:

- venkon de ĉiaj formoj de antaŭjuĝoj
- ke virinoj ricevas plene la samajn rajtojn kaj eblecojn kiel havas viroj
- la unuecon de la religioj kaj la rekonon ke religia vero estas relativa
- eliminadon de la ekstretoj de riĉeco kaj povreco
- ĝenerala edukado por ĉiuj
- ke ĉiu individuo sendepende strebu al la vero
- la starigon de tutmonda federacio de la nacioj
- la rekonon ke vera religio harmonias kun la racio kaj kun sciencaj eltrovoj

Bahaa vivmodelo

Bahá'u'lláh instruis ke ĉiu homo estas «minejo plena je juveloj» – juveloj nekonataj eĉ al la homo mem, des malpli al aliaj. La senco kaj celo de homa vivo estas konsciigi pri tiuj kapabloj kaj ilin kultivi – por kaj la propra bono kaj serve al la bono de la socio. Tiel la vivo surtere similas tiun antaŭnaskan: la moralaj, intelektaj kaj spiritaj povoj kiujn homo disvolvas dum sia ĉi-monda vivo estos liaj «membroj» kaj «organoj» bezonataj por la pluevoluado de la animo en la mondo transmorta.


Tial bahaanoj forte subtenas kaj kuraĝigas al plena disvolviĝo de la propra personeco. Ĉiutaga preĝado kaj meditado liberigu la animon de hereditaj vivkutimoj kaj malfermu por ĝi la vojon al novaj eblecoj. Kunlabori kun homoj el malsamaj fonoj helpas venki oftajn antaŭjuĝojn. La konsumado de alkoholo kaj de narkotaj aŭ halucinigaĵoj estu evitata – krom se preskribita medicine – ĉar ili damaĝas la menson. Evitendas ankaŭ klaĉoj kaj kalumnioj, ĉar ili subfosas interhoman fidadon kaj unuecon de kiuj dependas la prospero de la socio. La skriboj de Bahá'u'lláh emfazas la gravecon de familia vivo kiel la fundamento de la socio. La sankteco de geedzeco, rekono de la egaleco inter edzo kaj edzino kaj interkonsiliĝado inter ili estas aparte emfazataj.



Klaso por junuloj en Kanado



Evoluoprojekto en Bolivio



Infanoj antaŭ la eŭropa bahaa templo

La historia fono

Por bahaanoj evoluaj procezoj estas kerna vivfenomeno kaj aplikebla ankaŭ al la religio de Dio. La sinsekvaj stadioj kiujn ilia propra Kredo trapasis kiam ĝi iom post iom aperis kaj establiĝis estas en si mem indiko pri tiu evolua principo.

La disvolviĝon de la Bahaa Kredo karakterizas ankaŭ plia trajto komuna al la unuaj etapo de ĉiuj antaŭaj religioj: la nova epoko en la efektiviĝo de la volo de Dio alportas ŝanĝojn kaj novaĵojn kiuj ne estas bonvenaj al tiuj regantaj la ekzistantan socian ordon. Regule rezultis el tio severa persekutado de la adeptoj de la nova Kredo. Dum siaj unuaj 150 jaroj la Bahaa Kredo trapasis plurajn periodojn de tia subpremado.

Báb

La 23-an de majo 1844 en Ŝirazo, Persio, juna viro konata kiel Báb heroldis la baldaŭan aperon de Mesaĝisto de Dio atenditan de ĉiuj popolo. La titolo «Báb» signifas «Pordo». Kvankam mem sendependa revelacianto de Dio, Báb deklaris, ke li estas sendita de Dio por prepari la homaron por tiu evento.



Fortaj kaj severaj persekutoj fare de la islama klerikaro sekvis tiun deklaron. Báb estis arestita, torturita, enkarcerigita kaj fine publike ekzekutita la 9-an de julio 1850 sur publika placo en la urbo Tabrizo, en norda Irano. Ĉirkaŭ dudek mil el liaj adeptoj pereis poste en serio da masakroj. Hodiaŭ la majesta konstruaĵo kun la ora kupolo meze de belegaj ĝardenoj kaj panorame de la golfo de Haifa, Israelo, estas la sanktejo en kiu estas entombigitaj la fizikaj restaĵoj de Báb.

Bahá'u'lláh

Naskita en 1817, Bahá'u'lláh apartenis al unu el la grandaj nobelaj familioj de Persio, kies spuroj retrosekveblas ĝis al la regantaj dinastioj de la imperiestra pasinteco de la lando, familio riĉa kaj multposedanta. Ne akceptante la pozicion ĉe la reĝa kortego ofertita al li, Bahá'u'lláh famiĝis pro sia malavareco kaj bonkoreco, multamata de siaj samlandanoj.

Lia privilegia stato rapide nuliĝis post kiam Bahá'u'lláh deklaris sian apogon de la mesaĝo de Báb. Englutita de la ondoj da violento kiuj trafis la Báb-anojn post la ekzekuto de Báb, Bahá'u'lláh suferis ne nur la perdon de siaj havaĵoj sed estis ankaŭ

mem enkarcerigita, torturita kaj plurfoje ekzilita. La unua ekzilejo estis Bagdado, kie en 1863 li deklaris mem esti «Tiu Promesita» pri kiu Báb estis parolinta. De Bagdado Bahá'u'lláh estis sendita al Konstantinopolo (la nuna Istanbul), Adrianopolo (la nuna Edirne) kaj fine al la punkolonio Akko en Palestino, kie li kiel malliberulo alvenis en 1868.


De Adrianopolo kaj pli poste el Akko Bahá'u'lláh direktis serion da leteroj al la siatempaj regantoj, plej rimarkindaj dokumentoj en la religia historio. En ili estas proklamita la unuiĝo de la homaro kaj la establiĝo de tutmonda civilizacio. La reĝoj, imperiestroj kaj prezidentoj de la deknaŭa jarcento estis alvokataj interpaciĝi, malarmadi kaj dediĉi siajn energiojn al la efektiviĝo de ĝenerala paco.



Bahá'u'lláh en 1892 forpasis en Bahji, iom norde de Akko, kaj tie estas entombigita. Liaj instruoj tiutempe jam disvastiĝis ĝis trans la Mezoriento kaj Lia sanktejo hodiaŭ estas la umbilika punkto de tutmonda komunumo formita surbaze de tiuj instruoj.

'Abdu'l-Bahá

Ek de siaj infanaj jaroj 'Abbás Effendi, la plej aĝa filo de Bahá'u'lláh, suferis kun sia patro la longajn ekzilajn jarojn en mallibereco. Li alprenis la titolon 'Abdu'l-Bahá, «servanto de Bahá». Bahá'u'lláh en sia testamento faris 'Abdu'l-Bahá la solan aŭtoritatan interpretanton de la bahaaj instruoj kaj la gvidanton de la Kredo post sia forpaso. 'Abdu'l-Bahá montriĝis perfekta ekzemplo de bahaaj vivkonduko en sia vivo de servado kaj plena sindediĉo al la bono de siaj kunhomoj.



Dum 'Abdu'l-Bahá ankoraŭ estis malliberigito de la otomana imperio alvenis en 1898 en Akko la unuaj bahaaj pilgrimantoj el la Okcidento. Post sia liberiĝo en 1908 'Abdu'l-Bahá mem ekis al pluraj vojaĝoj, kiuj de 1911 ĝis 1913 kondukis lin al Eŭropo



Klaso por junuloj en Kiribato



Studcirklo en Vankuero, Kanado



Infanklaso en Kolombio



Komuna preĝado en Aŭstralio



Klaso por junuloj en Kiribato



Infanklaso en Mongolio

kaj Nordameriko. Tie li proklamis la mesaĝon de Bahá'u'lláh pri unueco kaj socia justeco al ekleziaj kunvenoj, porpacaj societoj, membroj de komercaj asocioj, universitataj fakoj, ĵurnalistoj, registaraj oficuloj kaj al multaj publikaj aŭskultantaroj.

Kiam forpasis 'Abdu'l-Bahá en 1921 estis li sukcesinta firme establi la junan Kredon kaj multe vastigi ĝian influon. Li estas entombigita sur Monto Karmelo en kriptoj najbare al kie la postrestaĵoj de Báb estas enterigitaj.

La unueco de la bahaanoj

Por ke bahaanoj povas efike proklami la unuecon de la homaro devas la bahaa komunumo mem esti firme unuigita. La unueco de la bahaanoj estas certigita per tio ke la skriboj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá klare instalas aŭtoritatan gvidadon por la plua disvolviĝado de la Kredo kaj por la administrado de ĝia internacia anaro.

Tiel la Bahaa Kredo dum sia malfacila unua jarcento estis protektita kontraŭ disfalo al diversaj sektoj kaj kapablas sin adapti al la bezonoj de rapide evoluanta civilizacio. La institucioj, en kiuj estas enkorpigita tiu aŭtoritato, estas la Gardanteco kaj la Universala Domo de Justeco.

La Gardanteco

'Abdu'l-Bahá en sia testamento nomumis sian plej aĝan nepon, Shoghi Effendi Rabbani, «Gardanto» de la Bahaa Kredo kaj aŭtoritata interpretanto de ĝiaj instruoj. Shoghi Effendi servis de la forpaso de 'Abdu'l-Bahá en 1921 ĝis sia morto en 1957.

Dum tiuj 36 jaroj la Gardanto tradukis multajn skribojn de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá al la angla, klarigis ilian signifon, spronis la starigon de lokaj kaj landaj bahaaj institucioj kaj gvidis la realigon de serio da planoj, kiuj celis al la plia disvastigado de la bahaaj idealoj tra la mondo.



En la Sankta Lando ne forgesiĝas la laboro de Shoghi Effendi pro la belega ĉirkaŭaĵo kiun li kreis por la tiea Bahaa Monda Centro. La kompletigo de la maŭzoleo, kiu entenas la korpajn restaĵojn de Báb, estas same lia laboro kiel la konstruado de la Internacia Bahaa Arkivo. Estis ankaŭ Shoghi Effendi kiu konceptis kaj aranĝis sur la bahaaj terenoj en Bahji, kie troviĝas la tombejo de Bahá'u'lláh, kaj sur la deklivoj de la monto Karmelo okulfrappe belajn ĝardenojn.

La Universala Domo de Justeco

La institucio de la Universala Domo de Justeco, konceptita de Bahá'u'lláh mem kiel leĝdona aŭtoritato de la Bahaa Kredo, establiĝis en 1963. Ĝi estas naŭ-membra konsilio elektata ĉiun kvinan jaron per ĉiuj anoj de la landaj gvidorganoj de la tuta bahaa mondo.



La Universala Domo de Justeco gvidas la spiritajn kaj administrajn aferojn de la internacia bahaa komunumo. Ĝi ankaŭ responsas pri la bahaaj sanktejoj kaj aliaj proprietajoj en la Sankta Lando. Dotita de Bahá'u'lláh kun la aŭtoritato fari leĝojn pri ĉiuj aferoj kiuj ne jam estas specife reglamentitaj en la bahaaj skriboj la Universala Domo de Justeco estas tiu institucio kiu zorgas pri la adaptiĝo de la tutmonda bahaa komunumo al daŭre ŝanĝiganta mondo.

La Bahaa Mondcentro

Kiel tri aliaj el la mondaj religioj (Judaismo, Kristanismo kaj Islamo) ankaŭ la Bahaa Kredo estas tra historiaj eventoj ligita al la Sankta Lando. La domojn kaj aliajn ejojn, kiuj rememoras pri la ekzilo de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá, la bahaa komunumo zorge restaŭris.




Ĉiujare miloj da bahaanoj venas al Haifa kaj Akko kiel pilgrimantoj havante la privilegion kune kun samkredanoj el ĉiuj mondanguloj viziti tiujn lokojn. Ĉiun kvinan jaron la elektitaj reprezentantoj de la naciaj bahaaj komunumoj kunvenas en Haifa por elekti la membrojn de la Universala Domo de Justeco, kiu gvidas la internaciajn aferojn de la Kredo elde sia sidejo sur la monto Karmelo.

La kunlaborantoj de la Universala Domo de Justeco estas bahaaj volontuloj venantaj de multaj diversaj landoj. Ili vivas en la regiono de Haifa kaj Akko kaj servas tie dum diverslongaj periodoj, de kelkaj monatoj ĝis pluraj jaroj, foje jardekoj.



Infanklaso en Panamo



Preĝkunveno en Toronto, Kanado



Studcirklo en Sarawak, Malajzio

La tutmonda bahaa komunumo

La bahaa komunumo hodiaŭ havas pli ol kvin milionojn da membroj, kiuj vivas en preskaŭ 200 sendependaj landoj kaj ĉirkaŭ 50 teritorioj sur la tuta planedo. Ĝian egan diversecon formas homoj devenantaj el preskaŭ ĉiuj grupoj, kredoj kaj kulturoj, reprezentantaj multe pli ol 2000 etnojn.

La Bahaa Religio ne havis pastrojn. Ĉar la homaro eniras la epokon de matureco ĉiu individuo kapablas mem esplori la revelacion de Dio kaj decidi pri la vivaferoj helpe de preĝado, pripensado kaj interkonsiliĝo kun aliaj. Por ebligi tion la bahaaj skriboj estas ĝis nun tradukitaj, almenaŭ parte, al ĉirkaŭ 800 lingvoj.



La sama principo validas por la komunuma vivo. Elektitaj konsilioj, nomataj «Spirita Asembleo» administras la aferojn de la Kredo kaj sur loka kaj sur landa nivelo. Ĉiuj plenkreskaj kredantoj estas same elekteblaj ĉe la ĉiujaraj sekretaj elektoj.

La laboron de la bahaa komunumo financas ekskluzive ĝiaj membroj mem per libervolaj donacoj. Kontribui al la bahaa fonduso estas konsiderata kiel privilegio de membreco; la Kredo ne akceptas financajn rimedojn de ekstere.

Bahaaj temploj

Bahaaj temploj, nomataj Adorejo, estas malfermaj al ĉiuj homoj. Kvankam laŭ arkitektura stilo tre variaj ili ĉiuj havas naŭ flankojn kaj centran kupolon, kio simbolas samtempe la diversecon de la homaro kaj ĝian esencan unuecon. Preĝkunveno estas simplaj: ili konsistas el preĝado, meditado kaj la recitado de eroj el la sanktaj skriboj de Bahaismo kaj de aliaj mondaj religioj.

Bahá'u'lláh antaŭvidis ke la bahaaj adorejoj fariĝu spiritaj centroj kun variaj institucioj apud la templo mem, dediĉitaj al sciencaj, sociaj, edukaj kaj administraj servoj.



Evoluoprojektoj

El la vidpunkto de socia kaj ekonomia evoluo la plej interesa trajto de la bahaa komunumo estas ĝia unika sistemo de interkonsiliĝado. Bahá'u'lláh instruis manieron de grupa decidado kiu baziĝas sur la strebado al unuanimeco. Oni povas diri ke la plej multaj bahaanoj iel estas studentaj la procezon de interkonsiliĝado. La eblecoj, kiujn tiu sistemo kapablas generi, unuafoje montriĝis dum la komencaj jaroj de la dudeka jarcento en Irano kie la bahaanoj kreis siajn proprajn lernejojn, klinikojn kaj aliajn sociajn servojn, inter alie ankaŭ la unuan iran lernejon por knabinoj.

Hodiaŭ bahaaj evoluoprojektoj multnombros, precipe en Azio, Latinameriko kaj Afriko. Al ili apartenas lernejoj, klinikoj, sanserva edukado, agrikulturaj projektoj, rearbarigoj, programoj kontraŭ alkoholismo kaj infanvartejoj. Bahaaj radioprogramoj elsendas ne nur pri tiaj praktikaj aferoj sed ankaŭ flegas indiĝenajn kulturojn. Bahaaj evoluoprojektoj, respondantaj al lokaj bezonoj konstatitaj de loka elektitaj Spiritaj Asembleoj, estas esence t. n. herbradikaj projektoj. Sendube tiu fakto multe kontribuas al tio ke tiuj projektoj plejparte financas sin mem.

La bahaanoj kaj la Unuiĝintaj Nacioj

La Bahaa Kredo instruas ke vera religio laboras por unueco kaj ke unueco estas fundamenta antaŭkondiĉo por establi mondan pacon. «La bonfarto de la homaro», diris Bahá'u'lláh, «ĝia paco kaj ĝia sekureco estos neatingeblaj, antaŭ ol kaj ĝis kiam ĝia unueco estos firme starigita».

La bahaa komunumo pledas por certaj rimedoj kontribuantaj al tutmonda unuiĝo, inter alie por tutmonda federacio de la nacioj, por la adopto de internacia helpa lingvo, por kunordigado de la tutmonda ekonomio, por ĝenerala eduka sistemo, por firma kodo de homaj rajtoj por ĉiuj popoloj, por integrita tutmonda komunikado kaj por tutmondaj mon-, pes- kaj mezurunuoj.

Konvinkite ke la institucio de la Unuiĝintaj Nacioj estas grava rimedo por antaŭenigi la unuiĝon de la planedo, bahaanoj ĝin jam dekomence kaj laŭeble subtenas. La Bahaa Internacia Komunumo (angle Bahá'í International Community, BIC) havas konsultan statuson ĉe la Ekonomia kaj Socia Konsilio (EKOSOK, angle ECOSOC) kaj ĉe la Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Urga Helpo al Infanoj (FUNUHI, angle UNICEF). La oficejoj de BIC en Novjorko kaj Ĝenevo kaj bahaanoj en multaj landoj regule partoprenas konferencojn, kongresojn kaj seminariojn okupiĝantaj pri la socia evoluo de nia planedo.

La suferoj kiujn iliaj samkredanoj spertis kaj ankoraŭ spertas kiel viktimoj de religia persekutado igas bahaanojn aparte sentemaj pri la homrajtaj instruoj de Bahá'u'lláh. La Bahaa Internacia Komunumo ĉe Unuiĝintaj Nacioj aktive sin enĝas por la rajtoj de minoritatoj, la emancipiĝo de virinoj, krimpreventado, kontrolado de narkotaĵoj, la bonfarto de infanoj kaj familioj kaj por malarmado.³²

Notoj:

1. Bahá'u'lláh, *Perloj de l'Saĝo*, Bahaa Esperanto-Ligo 1994; p. 28
2. Bahá'u'lláh, *Lawh-I-Maqsúd* 11:9 + 13
3. 'Abdu'l-Bahá, *La sep kandeloj de l' unueco el Selections from the writings of 'Abdu'l-Bahá*, Bahá'í World Centre, Haifa 1982, p. 32
4. El memorando de la 16-a de aŭgusto 1995 preparita de la esplordepartemento de la Universala Domo de Justeco
5. ESPERANTO, n-ro 300-301, 8-9, aŭg./sep. 1925
6. ESPERANTO, n-ro 503, p. 129
7. Isaj Dratwer, *Lidja Zamenhof. Vivo kaj agado*, Antverpeno - La Laguna, 1980, p. 60
8. *Kitáb-i-Aqdas*, noto 193
9. La Universala Domo de Justeco, letero de la 6-a de oktobro 1976 al Bahaa Esperanto-Ligo
10. La Universala Domo de Justeco, letero de la 19-a de marto 1973 al la iniciatintoj de Bahaa Esperanto-Ligo
11. Tiun „nur“ poste ellasis la redaktejo de *Heroldo de Esperanto!*
12. *Heroldo de Esperanto*, n-ro 34, junio 1926
13. Wendy Heller, *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto*, Antverpeno, 2007, p. 125-126
14. El letero de la 25-a de januaro 1943 skribita en la nomo de Shoghi Effendi al individua kredanto
15. La Universala Domo de Justeco, *Unu komuna Kredo*, Haifa 2005, §40
16. *Unu komuna Kredo*, §27
17. *Unu komuna Kredo*, §41
18. *Unu komuna Kredo*, §41
19. *Lights of Guidance*, New Delhi: Bahá'í Publishing Trust, 1988, p. 73
20. El enkonduko al kompilaĵo preparita en januaro 1985 komisiite de la Universala Domo de Justeco
21. *Kitáb-i-Aqdas*, §189
22. 'Abdu'l-Bahá, *Tablets*, vol. 3, Chicago / New York, 1916, p. 596
23. 'Abdu'l-Bahá, *Tablets*, vol. 3, Chicago / New York, 1916, p. 692
24. *'Abdu'l-Bahá on Divine Philosophy*, compiled by Isabel Fraser Chamberlain, Boston 1918, p. 84-85
25. *Kitáb-i-Aqdas*, noto 193
26. Abdul'-Bahá, *Sameco de la lingvoj kiel rimedo por la unuigo de la homaro*; parolado en kunveno de la esperantistoj en Stutgarto, Germanio, la 5-an de aprilo 1913; *Germana Esperantisto*, n-ro 5A, Majo 1913; represita en *La Nova Tago*, n-ro VI,2 (aŭg. 1930)
27. *Turnopunkto por ĉiuj Nacioj*, deklaro de Bahaa Internacia Komunumo okaze de la 50-jariĝo de Unuiĝintaj Nacioj; Novjorko 1995; III A. 4
28. Shoghi Effendi, *Directives of the Guardian*; Wilmette, Ill.; Bahá'í Publishing Trust; p. 39
29. *Gleanings from the Writings of Bahá'u'lláh*, Wilmette: Bahá'í Publishing Trust, 1983, p. 250
30. Literaturo: Isaj Dratwer, *Lidja Zamenhof. Vivo kaj agado*, Stafeto Antverpeno - La Laguna, 1980; Wendy Heller, *Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto*, FEL, Antverpeno, 2007; *Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj. La originala verkaro de Lidia Zamenhof*, FEL, Antverpeno, 2008
31. Mallongajn vivpriskribojn de la «Manoj» vidu en: Barron Harper, *Lights of Fortitude: Glimpses into the Lives of the Hands of the Cause of God*, Oxford, 1997
32. Verkita surbaze de eroj el <http://info.bahai.org> kaj de *The Bahá'í World* 1995-96, Bahá'í World Centre, Haifa, 1997, p. 4-16

Glosaro:

'Abbás Effendi -> 'Abdu'l-Bahá.

'Abdu'l-Bahá («servanto de Bahá», pr.: Abdul-bahá), titolo kiun donis al si 'Abbás Effendi, 1844-1921, plej aĝa filo kaj nomumita posteulo de Bahá'u'lláh.

Akko -> Bahaa Monda Centro.

Báb («pordego»), titolo de Siyyid 'Alí-Muhammad, 1819-1850, Fondinto de Babismo kaj Heroldo de Bahá'u'lláh.

Bahaa Monda Centro, la tutmonda spirita kaj administra centro de Bahaismo, lokita en Haifa kaj Akko en Palestino, Israelo.

Bahá'u'lláh («Gloro de Dio», pr.: baha'-ulla'), titolo de Mírzá Husayn-'Alí (pr.: mirza husejn alí), 1817-1892, la fondinto de Bahaismo; la skribojn de Bahá'u'lláh bahaanoj konsideras esti rekta revelacio de Dio.

Bahji (pr.: bahĝi), areo norde de Akko en Palestino kie Bahá'u'lláh vivis de 1880 ĝis sia forpaso en 1892 kaj kie nun troviĝas ene de vastaj ĝardenoj lia tombo.

BEL (Bahaa Esperanto-Ligo), asocio de bahaanoj esperantistoj, iniciatita en 1972 kaj fondita en 1973 kun la aprobo de la Universala Domo de Justeco, kunlaboranta kiel faka asocio kun Universala Esperanto-Asocio ek de 1975.

Gardanto -> Shoghi Effendi.

Haifa -> Bahaa Monda Centro.

Kitáb-i-Aqdas (pr.: kitab'-i-akdas), la «La Plej Sankta Libro» revelaciita en Akko en 1873, entenas la ĉefan leĝaron de Bahá'u'lláh kaj konsiderata de bahaanoj kiel la ĉarto de estonta monda civilizacio.

Mano de la Afero de Dio, rango distinginta aŭ postmorte aŭ jam dumvive individuajn bahaanojn pro elstaraj servoj al la Kredo; Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá nomumis po kvar kaj Shoghi Effendi la ceterajn 42 de la entute nur 50 «Manoj»; ĉar sole tiuj tri posedis la aŭtoritaton ilin nomumi, en 2007 per la forpaso de la lasta el ili la institucio de la «Manoj de la Afero» ĉesis ekzisti.

Mírzá Husayn-'Alí -> Bahá'u'lláh.

Monto Karmelo (Carmel), monto en Haifa, Israelo, kiun la profeto Jesaja nomis la «monton de Dio» kaj kie hodiaŭ troviĝas la Bahaa Monda Centro.

Nacia Spirita Asembleo, la gvida administra organo sur nacia nivelo elektita ĉiujare dum nacia konvento.

Qá'im (pr.: kaim), «Tiu kiu leviĝos», laŭ ŝijaisma Islamo la dekdua imamo, kiu revenos por inaŭguri justan mondan regnon; la Báb pretendis esti la Qá'im.

Shoghi Effendi (pr.: ŝogi efendi), titolo de Shoghi Rabbani, 1897-1957, pranepo de Bahá'u'lláh kaj plej aĝa nepo de 'Abdu'l-Bahá, nomumita de 'Abdu'l-Bahá kiel «Gardanto» de la Bahaa Kredo, oficon kiun li plenumis de post ties forpaso en 1921 ĝis sia propra morto en 1957.

Universala Domo de Justeco, La, plej supera gvida kaj leĝdona organo de la tutmonda bahaa komunumo kun sia sidejo en Haifa, Israelo; instaligis en 1963 laŭ la direktivoj de Bahá'u'lláh kaj 'Abdu'l-Bahá; estas elektata ĉiujn kvinan jaron de la membroj de ĉiuj Naciaj Spiritaj Asembleoj.



Bahaa literaturo en Esperanto

La ĉi-sube donita listo entenas la plej multan en Esperanto aperintan bahaan literaturon; ĝi tamen ne estas kompleta; mankas precipe etaj broŝuroj kaj faldfolioj k.s., kiuj kelknombro aperis. Ankaŭ estas la bibliografiaj indikoj pri la fruaj eldonaĵoj mankohavaj. La listo estas aranĝita laŭ la eldonjaro.

La Nova Tago – Internacia Bahaa Esperanto Gazeto, publikigita kvaronjare inter 1925 kaj 1936 de «La Bahaa Esperanto-Eldonejo Wandsbek» kaj poste de «La Bahaa Esperanto-Eldonejo Weinheim» resp. «Bahaa Esperanto-Eldonejo 'La Nova Tago'».

Historio, instruoj kaj valoro de Baha'i-Movado, de Hermann Grossmann, Esperanto-komitato de la Baha'i-Movado Hamburg, 1925; 8 paĝoj.

Baha'u'llah kaj Lia Misio, de John E. Esslemont (aperis en la 20-aj jaroj).

La Kaŝitaj Vortoj de Bahá'u'lláh, trad. el la persa originalo de J. E. Esslemont kaj L. Hakim (aperis en la 20-aj jaroj). Novan tradukon de E. Rodriguez Ontario eldonis Bahaa Esperanto-Ligo, Fortaleza-Ceará Brazilo, 1981; 56 paĝoj. Reviziita eldono: Bahaa Esperanto-Ligo, Bahaa Eldonejo Hispanio 2009.

Bahaaj Pruvoj de Vivo post Morto, de Martha L. Root (UK-prelego; aperis en la 20-aj jaroj).

9 – Kompilaĵo de bahaaj vortoj (aperis en la 20-aj jaroj).

La esenco de l' Bahaismo, de Hermann Grossmann (aperis en la 20-aj jaroj).

Bahaismo kaj politiko, de Ernst Kliemke (artikolo aperinta ankaŭ en La Nova Tago IV-4, p. 37 k.s.; aperis en la 20-aj jaroj).

Bahá'u'lláh kaj la nova epoko de J. E. Esslemont, trad. Lidia Zamenhof, unua eldono: Bahaa Esperanto-Eldonejo «La Nova Tago», 1930; dua, ĝisdatigita eldono: Bahaa Esperanto-Ligo, 1978; 324 paĝoj.

Homo, Dio, Profeto, de Lidja Zamenhof, Bahaa Esperanto-Eldonejo, Weinheim, 1931 (parolado farita okaze de la bahaaj fakunveno dum la XXII-a Universala Esperanto-Kongreso en Oxford, la 8-an de aŭgusto 1930).

La Bahaa Revelacio (esperanta traduko de broŝuro eldonita en Usono – probable el la 30-aj jaroj); 17 paĝoj.

Parizaj Paroladoj de 'Abdu'l-Bahá; trad. Lidja Zamenhof, Bahaa Esperanto-Eldonejo «La Nova Tago», Weinheim, 1932; represon eldonis la Nacia Spirita Asembleo de la Bahaanoj de Svislando, Berno, 1978; 110 paĝoj.

Bahaaj Informoj, bulteno eldonita de Internacia Bahaa Oficejo, Ĝenevo, de 1947 ĝis 1949 (entute 14 numeroj).

Bahaismo – la religio de Paco, de Lidja Zamenhof, (reaperigo de la samtitola artikolo de Lidia Zamenhof el «La Nova Tago» - julio 1931) Bahaa Esperanto Komitato, Neckargemünd apud Heidelberg, 1959; 8 paĝoj (reprezo de Imprinta Gutenberg, La Laguna, aperis en 1966).

La Mondreligio, de Shoghi Effendi (skizo de la celoj, instruoj kaj historio de Bahaismo verkita de ĝia «Gardanto» por la Speciala Komitato de la Unuiĝintaj Nacioj por Palestino, julio 1947; esperanta traduko de Roan U. Orloff); 8 paĝoj.

Mesaĝo de 'Abdu'l-Bahá de la 17-a de decembro 1919 al la Centra Organizo por Daŭra Paco, Den Haag, Nederlando, Bahaa Eldonejo Germanio 1964; 15 paĝoj.

Kio estas la Bahaa Religio, de Hermann Grossmann, Bahaa Eldonejo Germanio 1969; 60 paĝoj.

Unueco kaj Universala Lingvo, de Johano Dale, trad. R. Orloff-Stone, Bahaa Esperanto-Ligo, Fortaleza-Ceará-Brazilo, 1976; 29 paĝoj.

Bahaaj Respondoj, el la hispana trad. P. A. Cardoso, Bahaa Esperanto-Ligo, Fortaleza-Ceará-Brazilo, 1977; 30 paĝoj.

Komunio kun Dio, bahaaj preĝoj, Bahaa Esperanto-Ligo; 22 paĝoj.

Bahá'í: La Mondkredo por la Nuntempa Homaro, de Arthur L. Dahl, trad. R. Orloff-Stone, Bahaa Esperanto-Ligo, 1981; 22 paĝoj.

La Promeso de Malarmado kaj Paco; Bahaa Esperanto-Ligo, 1983; 11 paĝoj.

La Promeso de Monda Paco (Mesaĝo de la Universala Domo de Justeco al la popoloj de la mondo de oktobro 1985), Bahaa Esperanto-Ligo, 1986 (represon faris la Hispana Bahaa Eldonejo); 21 paĝoj.

Koresponda Kurso, Bahaa Esperanto-Ligo, 1986, 64 paĝoj.

La Bahaa Religio – Vojo al la Paco, Bahaa Eldonejo Germanio, Hofheim 1987; 16 paĝoj.

Turnopunkto al Tutmonda Socio, de Ingo Hofmann, Bahaa Eldonejo Germanio, Hofheim 1988, 10 paĝoj.

La Bahaa Religio, de Heinz-Dieter Maas, Artur E. Iltis, Saarbrücken 1987; 31 paĝoj.

La Bahaa Kredo, Bahaa Internacia Komunumo, Bahaa Eldonejo Britio 1989; 16 paĝoj.

Bahá'u'lláh (Deklaro preparita de de la Bahaa Internacia Komunumo okaze de la centjariĝo de la forpaso de Bahá'u'lláh 1992), Bahaa Esperanto-Ligo, Belvaux, 1992; 60 paĝoj.

La Nekredebla Paradoxo. The Incredible Paradox, de Vinson Brown (dulingva angla-esperanta, E-traduko de D. Evans); Naturegraph Publishers, Happy Camp, 1992; 63 paĝoj.

Preĝoj, Bahaa Esperanto-Ligo, Frankfurt, 1992 (represon faris la Hispana Bahaa Eldonejo); 70 paĝoj.

Perloj de l' Saĝo el la Skriboj de Bahá'u'lláh; Bahaa Esperanto-Ligo, Frankfurt, 1994, 56 paĝoj.

Bahaimso kaj Esperanto, Festlibro okaze de la 25-jariĝo de Bahaa Esperanto-Ligo, Frankfurt 1997, 57 paĝoj.

Al la Religiaj Gvidantoj de la Mondo, Mesaĝo de la Universala Domo de Justeco de aprilo 2002, Bahaa Esperanto-Ligo, Hofheim 2002; 4 paĝoj.

Unu komuna kredo (komisita de la Universala Domo de Justeco, Haifa 2005), Bahaa Esperanto-Ligo, Hofheim 2008; 17 paĝoj.

Lidia. La vivo de Lidia Zamenhof. Filino de Esperanto, de Wendy Heller, FEL, Antverpeno, 2007.

Por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj. La originala verkaro de Lidia Zamenhof, FEL, Antverpeno, 2008.

Precipe la pli junaj titoloj estas haveblaj ĉe esperantaj libroservoj aŭ ĉe:

Bahaa Esperanto-Ligo, Eppsteiner Str. 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio; bel@bahai.de
La plej multaj titoloj ankaŭ elŝuteblas de la hejmpaĝo de BEL: www.bel.bahai.de resp. www.bahaaeligo.bahai.de

La Bahaa Religio – realigado de la zamenhofaj idealoj de homara interfratiĝo kaj religia unueco

Bahá'u'lláh ...

- estas la fondinto de la Bahaa Religio
- vivis de 1817 ĝis 1892
- naskiĝis en Persio en nobela familio
- suferis 40 jarojn da persekutado kaj ekzilo
- revelaciis Sanktajn Skribojn je la amplekso de pli ol 100 volumoj
- estas la plej juna el vico da Diaj Profetoj al kiu apartenas Abrahamo, Kriŝno, Moseo, Budho, Zoroastro, Kristo kaj Mahometo

Bahá'u'lláh instruis ...

- ke estas nur unu Dio
- ke ĉiuj religioj de la mondo reprezentas unu komunan, neŝanĝeblan, eternan Kredon
- ke la tuta homaro estas unu familio kun la destino kunvivi en paco kaj harmonio
- ke la senco de la homa vivo surtere estas spirita kreskado kiel prepariĝo por posta eterna vivo

Al la bahaaj principoj apartens ...

- la unueco de la homaro
- la samrajteco de virinoj kaj viroj
- la venko de ĉiaj antaŭjuĝoj
- ekonomia justeco kaj ekvilibro
- ĝenerala edukado
- harmonio inter scienco kaj religio
- **la neceso adopti mondan helpan lingvon**
- la starigo de tutmonda federacio de ĉiuj nacioj gardanta firman pacon surbaze de la prinipo de kolektiva sekureco

Bahaanoj ...

- laboras por la starigo de daŭre progresanta, daŭriva tutmonda civilizacio kaj kulturo
- strebas gardi en ĉiuj siaj agoj altajn etikajn kaj moralajn principojn
- ĉiutage preĝas kaj meditas
- konsideras fortajn kaj sanajn familiojn la fundamento de la socio
- kondukas pli ol 3.000 evoluoprojektojn sur la terenoj de edukado, klerigo, medioprotektado, socia kaj ekonomia evoluigo

La bahaa komunumo ...

- funkcias sen pastroj
- sin fincas sole per libervolaj donacoj de siaj membroj
- administras siajn aferojn surbaze de unika sistemo de tutmonda reto de libere kaj demokrate elektitaj konsilioj de laikoj
- establis siajn Lokajn Spiritajn Asembleojn en jam ĉirkaŭ 10.000 urboj kaj vilaĝoj tra la tuta mondo
- estas preskaŭ ĉiulande reprezentata de ĉiujare elektata Nacia Spirita Asembleo

La Bahaa Religio ...

- establis komunumojn en jam pli ol 190 landoj
- estas la geografie due plej disvastiĝinta religio post Kristanismo
- apartenas al la plej rapide kreskantaj religiaj movadoj de la mondo
- havas pli ol kvin milionojn da anoj de preskaŭ ĉia nacia, etna, religia kaj socia fono



Ĉie tra la mondo bahaaj komunumoj ofertas al siaj kunhomoj partopreni en iliaj preĝkunvenoj, infanklasoj por etika edukado, junulaj grupoj por trejni la personajn kapablojn kaj studgrupoj por kune studi la Sanktan Vorton, same kiel ankaŭ en aliaj iliaj aktivecoj.

Tre multajn lokajn bahaajn komunumojn tra la tuta mondo eblas facile kontakti tra la interreto.
Bona elirpunkto estas la plurlingvaj paĝoj: www.bahai.org

Ankaŭ multas naciaj kaj lokaj paĝoj. En Esperanto informas la paĝoj de Bahaa Esperanto-Ligo: www.bel.bahai.de

Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) kompreneble ankaŭ perpoŝte estas kontaktebla kaj volonte peras pliajn informojn:
Bahaa Esperanto-Ligo, Eppsteiner Straße 89, DE-65719 Hofheim-Langenhain, Germanio; bel@bahai.de